

I. 1474.564  
17.10  
ADAM MICKIEWICZ

\*\*\*

SINJORINO  
TWARDOWSKA.



•TRADUKIS

A. GRABOWSKI.



SZEKSZÁRD,  
PRESEJO DE LA GAZETO »LINGVO INTERNACIA«,  
PAUL DE LENGYEL.





ADAM MICKIEWICZ

\*\*\*

SINJORINO  
TWARDOWSKA.



TRADUKIS

A. GRABOWSKI.



SZEKSZÁRD,  
PRESEJO DE LA GAZETO »LINGVO INTERNACIA«,  
PAUL DE LENGYEL.

*A. Rogowski*



I 1.474.564



1904 K 650/128



AL LA AŬTOROJ DE »HISTORIO DE LA LINGVO  
UNIVERSALA«, SINJOROJ DOKTOROJ

L. COUTURAT KAJ L. LEAU,

KIUJ PER SIA VERKO VEKIS EN MI LA MALNOVAN

KREDON KAJ AMON POR LA

LINGVO INTERNACIA ESPERANTO,

TIUN ĈI MALGRANDAN LABORON DEDIĈAS

LA TRADUKINTO.

*Brzeziny (Piotrk. gub.) 1904.*



AL LA AUTOREN DE HISTORIO DE LA LINGVA

UNIVERSAL, SENJORI PORTORO

L. GOTTFRAT JOH. F. FRANZ

KUN PER SIA VERBO VERIS EN SIA MALNOVA

KURSON KAJ UNDAJ FORAS

LINGVO INTERNACIA ESPERANTO

TRIN LA MALGRANDA LINGVODIRKCA

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

BRUKINDITO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO


LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO

LA 1<sup>a</sup> PARTO DE LA 1<sup>a</sup> SERIO



## Sinjorino Twardowska.

Oni manĝas, trinkas, bruas,  
Fumo, danc', diboĉ' petola ;  
Tutan la drinkejon skuas :  
Ha, ha, hi, hi, hejse, hola !

Twardowski\*), ĉe l' fino tabla,  
Kiel *baŝa* sin apogas,  
Krias : He, diboĉ' diabla !  
Ridigas, timigas, logas.

Jen soldat', kun brava vido,  
Ĉiujn insultas kaj puŝas ;  
Sonis glav', orelon tuŝas :  
El soldat' — jam leporido.

---

\*) *Twardowski*, pola sorĉisto, kiel la germana Faust.

El vaz' tribunal'-patrono  
 Manĝis sen parol' ĝis fundo ;  
 Li eksonoris per mono.  
 El patrono — korta hundo.

Al botist' je l' naza rando  
 Li frapis, al kap' tubeton  
 Metis, ŝmac'! da gdanska\*) brando  
 Pumpas plenan bareleton.

Dum li trinkis, en kaliko  
 Ekfajfis, ekgrincis io ;  
 Funde . . . »Kia artifiko!  
 Baptan', vi venas pro kio ?«

Diablet' sur fund' en vino,  
 Laŭ mallonga vest', germano ;  
 Gastojn, ĉapelet' en mano,  
 Li salutas per ekklineo.

Saltas plankon el la loko,  
 Kreskas al duuln'-mezuro,  
 Nazo — hoko, pied' de koko,  
 Kaj la ungoj de vulturo.

---

\*) *Gdansk* hodiaŭ germane *Danzig*.



»Ah, Twardowski? salut' frato!«  
 Li iras rekte al celo,  
 »Bona do al vi konato,  
 Mi estas Mefistofelo!

»Vi kun mi sur Mont' Senhara\*)  
 Faris pro l' anim' kontrakton;  
 Sur fel' bova skribis akton  
 Via moŝt' kaj diablara.

»Devis servi volon vian  
 Ni, ĝis du jaroj trakuros;  
 Tiam Romon vi veturos,  
 Kaj ni kaptos kiel sian.

»Sepa jar' trakuris teron  
 Post lim' de kontrakta diro;  
 Vi turmentas la inferon  
 Eĉ ne pensas pri vojiro.

»Sed la venĝo, malrapida,  
 Pelis vin retojn; jen estas  
 Rom' drinkeja nom' insida,  
 Vian moŝton mi arestas.«

---

\*) Pole »*Lysa góra*«, monto de sorĉistoj.

Twardowski al pord' ekpenis  
 Post tia *dictum acerbum*  
 Je l' *kontuŝ* \*) diabl' retenis :  
 »Kie do *nobile verbum* ?«

Kion fari ? Jam finite,  
 Ne elpensos mi konsilon . . .  
 Sed . . . Twardowski ; jen subite,  
 Donas novan malfacilon :

»Al kontrakt', Mefistofilo,  
 Tie estas kondiĉaro :  
 Kiam vi, post tiu jaro,  
 Venos kun anim'-prenilo,

»Mi havos rajton, trifoje  
 Al labor' vin jungi laste ;  
 Eĉ plej malfacilan ĝoje  
 Vi plenumos, senprokraste.

»Jen drinkeja emblemato :  
 Ĉeval' pentrita sur tolo ;  
 Sur ĝin salti mia volo,  
 Frapu hufoj per ekbato.

---

\*) Nacia pola vesto de nobeloj.

»El la sablo vipon faru,  
 Mi ĝin uzos por alpelo;  
 En l' arbareto preparu  
 Konstruaĵon — por hotelo.

»Konstruaĵ' el nuks'-grajneroj  
 Alta ĝis supro Krempaka,  
 Tegment' el judbarboj, faka,  
 Kovrita per papaveroj.

»Vidu jen najleton feran,  
 Tricol'-longo, col'-dikeco:  
 Vi en ĉiun papaveron  
 Batu tri de l' sama speco!«

Saltas al labor' diablo,  
 Ĉevalon nutras, preparas,  
 Tordas vipon el la sablo,  
 Kaj jam en preteco staras.

Pan Twardowski, sur kurulo,  
 Provas eksaltojn, turnadon,  
 Paŝon, troton, galopadon,  
 Jen! — konstruo laŭ postulo.

»No! vi gajnis; sed, bap­tano,  
Dua provo ne finita;  
Jen en plado por vi bano,  
Kaj tie — akvo benita.«

Diablo ŝvitas, sufokiĝas,  
Kuntiriĝas al duono, —  
Estr'-ordono, sen pardono! —  
Ĝis la kolo li baniĝas.

Elsaltis kun ĵet'-rapido,  
Skuiĝis, ternis pro sano:  
»Nun vi jam sub nia brido,  
Finita plej bola bano.«


»Ankor' unu, tiam fino,  
Tuj rompiĝos fort' diabla,  
Ekrigardu, jen virino,  
Mia edzinet' afabla.

»Mi jaron ĉe l' belzebubo  
Por vi loĝos en infero,  
Kaj dume mia kerubo  
Kun vi, kiel edz' sur tero.

»Ĵuru ŝin amon, dediĉon,  
Ŝaton, obeon, adoron,  
Rompu eĉ unu kondiĉon,  
Kontrakto perdis valoron.«

Al li orejon atente,  
Al in' ekstrabon kun viglo  
Turnis diabl', kaj momente  
Jam proksimiĝis al riglo.


Ĉar lin Twardowski tre tedas,  
De pord', fenestro puŝante,  
Tra ŝlosiltru' sin ekspedas,  
Ĝis nun forkuras konstante.




- 90.000,-

M-na 16.06.94  
Kolekcyoner

90.000,-







Biblioteka Narodowa  
Warszawa



30001021750289



**BN**

BIBLIOTEKA  
NARODOWA

1.474.564

---

---

